



Unum ovile et unus pastor.  
Unu ŝafejo kaj unu paŝtanta.  
(JOH., X, 16.)

# ESPERO KATOLIKA

INTERNACIA MONATA GAZETO, OFICIALA ORGANO de I. K. U. E.

---

## KONVERTIĜO

de Anglikanaj Monaĥoj kaj Monaĥinoj.

Antaŭ ne multaj semajnoj okazis la konvertiĝo de la monaĥoj de la insulo Caldey, ĉe la suda marbordo de Kimrujo, kaj ankaŭ de la monaĥinoj de la Abatejo de Sankta Brigido apud Millford Haven en la sudokcidenta angulo de la sama lando (Kimrujo).

Ili ambaŭ estis gemonaĥoj Anglikanaj, vivintaj (kaj ankoraŭ vivantaj) laŭ la regulo de Sankta BENEDIKTO.

Aliaj ordenoj en la Anglikana Eklezio sin starigis sen la aprobo, kaj kelkafoje kontraŭ la volo de la Episkoparo, sed la monaĥoj de Caldey havis la aprobon de la Ĉefepiskopo de Canterbury — D-ro TEMPLE, la Primato de tuta Anglujo — de la Ĉefepiskopo de York, la Primato de Anglujo, kaj de aliaj. Ili portadis la vestaĵon kaj vivadis laŭ la regulo *plej severa* de S-ta BENEDIKTO. Ili uzis la Brevieron kaj Misalon, kiuj estis aprobitaj de la Sankta Seĝo por la katolikaj Benediktanoj; kaj antaŭ ĉio mi kredas, ke mi estas prava dirante, ke ili eĉ allasis la Dian Superecon de la Papo.

De ĉio tio ĉi oni povas vidi ilian simpatiecon kun ni, katolikoj, kaj ilian sincerecon kaj grandan fervoron. Sed

ili tre akre sentis sian isolecon. Ili sentis, ke ili vivadis tute solaj kaj apartigitaj. La katolikoj, de kies Eklezio ili elĉerpadis sian spiritan nutraĵon, ne volis akcepti ilin, kaj iliaj samreligianoj ĉiam ilin suspektis. Do dum la granda fasto de la lasta jaro (1912) post longa pripensado kaj senĉesa preĝado ili decidis, ke ia estreco de la flanko de la Episkoparo estas necesa por sia ekzistado kiel monaĥaro. Laŭe ili petis de la nuna Ĉefepiskopo de Canterbury (jam mortis D-ro TEMPLE), ke li favordonu al ili sian gvidadon kaj estrecon. Ŝajnas, ke la Ĉefepiskopo ne volis tion fari; almenaŭ laŭ lia konsilo ili petis la saman favoron de D-ro GORE — la Episkopo de Oxford. D-ro GORE, antaŭ ol konsenti ilin estri kaj supervidi, sendis D-ron DARVEL STONE kaj S-ron IREVELLYAN por inspekti kaj ekzameni la Caldey'an monaĥejon. Ricevinte ilian raporton li skribis al la Abato, Dom Aelsed CARLYLE, postulante ke, antaŭ ol konsenti pri estreco kaj supervido, kvar kondiĉoj *devas esti* de ili **nepre plenumitaj**: — 1-e ke la bieno de la monaĥejo fariĝu laŭleĝe la posedaĵo de la Anglikana Eklezio; 2-e ke la monaĥoj — [pastroj- aŭ havantaj ordenon (in orders)] uzu la liturgion de la „*Libro de Komuna Preĝo*” kaj diru Matutino kaj Vesperhimnon laŭmaniere de la Anglikana Eklezio; 3-e ke la kutimoj de la Elmontro kaj Beno de la plej Sankta Sakramento estu forigataj; kaj 4-e ke la doktrinoj de la Senmakula Koncepciono kaj de la Korpa Asumpcio de Nia Sinjorino — S-ta Maria — estu forstrekita de iliaj Brevieroj kaj Misaloj.

Nun, inter la Episkopo kaj Abato trapasis multe da korespondado. Ĉi tiun korespondadon, laŭ peto de la Abato, ĉiu monaĥo ekzamenis aparte kaj (ekzameninte) esprimis skribe sian opinion pri la jena demando: „Kion fari nun?”

La 18-an de Februaro, la Abato unue, kaj ĉiu monaĥo poste, legis siajn opiniojn, kiuj estis praktike unuanime jenaj — „ke la postuloj de la Episkopo plene klarigis al ili, ke ilia kredo, kaj religiaj ekzercoj, ne povas esti aprobitaj en la Anglikana Eklezio, kaj ke do, ili devas eniri

en la Katolikan Eklezion.” Sekve la frataro skribis al la Episkopo, sciigante al li, ke kun bona konscienco ili ne povis obei aŭ plenumi liajn postulojn. Al ĉi tiu letero signis siajn nomojn 27 el la monaĥoj — preskaŭ ĉiuj. La 22-an de Februaro ili skribis al Dom BEDE CAMM, kato-  
lika Benediktano, petante ke li venu al Caldey por ilin helpi. La fina rezultato estas, ke preskaŭ ĉiuj la monaĥoj en Caldey fariĝis Katolikoj. La sama rezultis en la monaĥejo de S-ta BRIGIDO apud Millford Haven. Do — „Laus Deo”. Sed imagu la animstaton de miloj da Anglikanoj, kiuj firme kredas la samajn doktrinojn pro kiuj la monaĥoj de Caldey estas devigitaj forkuri de la Protestanta Eklezio. Katolikoj — viajn preĝojn!!

Patrick PARKER.

Kilmyhall, Ferns. Ireland.

---

## PRI KRISTANA REUNUIĜO.

**Parolado, farita en Nia Unua Katolika Kongreso en Paris, Aŭgusto 1910, de S-ro A. H. NANKIVELL.**

---

### Antaŭa klarigo.

Pro diversaj kaŭzoj ni prokrastis presigi tiun ĉi altinteresan paroladon. Sufiĉas memorigi al niaj legantoj, ke la oficiala kaj kompleta Raporto, anoncita post nia „Unua”, pro manko da subskribintoj, ĝis nun ne aperis. En „Nia Tria” oni decidis iom post iom presigi en E. K. la diversajn kaj tre gravajn paroladojn, faritajn dum niaj tri unuaj kongresoj.

Tiu bela kaj klera parolado de S-ro NANKIVELL havas specialan valoron, kaj certe kortuŝos niajn legantojn, kiam ni sciigas al ili, ke du jarojn post la unua kongreso ĝia simpatia aŭtoro, forlasante sian situacion en la Anglikana Eklezio, konvertiĝis al la Katolika Eklezio, kaj sin submetis kun sia pia edzino, al tiu „Cathedra Petri”, kiun li jam amis kaj honoris, kiam li ne ankoraŭ ricevis la plenan lumon de la S-ta Spirito.

Eble, se li devus denove pritrakti la saman temon, li *iome* ŝanĝus sian tezon. Sed estas mirinde konstati, ke jam lia parolado kaj la parolado de sia amiko S-ro Spencer

JONAS estas preskaŭ tute ortodoksa, kaj, se oni esceptas unu aŭ du frazojn, ĝi povus esti verkita de katolika verkisto.

Laŭ ni, tia bela verko devas naski ĉe la animo de ĉiu katoliko du pensojn pri la graveco de Esperanto je la katolika vidpunkto.

1-e. La internacia lingvo *sole* donas la okazon sciigi al la mondo la gravecon de la Romema movado, kiu ekzistas en la sino de la Anglikana Eklezio. Ni estas certaj, ke neniu ne-angla katoliko eĉ suspektis, ke en la Eklezio starigita de Henriko VIII kaj Elisabeth, kiu mortigis tiom da Martiroj, kiujn la krista Eklezio honoras kiel sanktulojn, enhavas nun centojn, eble milojn da infanoj, kiuj nun kore kaj anime laboras por la reunuiĝo kun la S-ta Roma Seĝo.

2-e. Esperanto ne nur malkovris al la katolika mondo tiun ĝojan fakton, ĝi ankaŭ multhelpas al la realigo de tiu reunuiĝo. Ni povas certigi al niaj legantoj, ke, de post tri jaroj, multaj el niaj karaj disiĝintaj gefratoj (inter ili pluraj pastroj) eniris la kristan Eklezion dank' al interrilatoj ebligita per Esperanto. La sankta celo de la reunuiĝo de la kristanaro estas helpata ĉu per la reveno de societoj („corporate reunion”) kiel ni vidas antaŭ 3 jaroj en Ameriko, kaj tiun ĉi faron en Caldey en Anglujo, ĉu per la konvertiĝo de individuoj, ekzemple la aŭtoro de tiu ĉi parolado; *kaj ni havas la konvinkon, ke Esperanto estas rimedo donata, same kiel ĉiu bona ilo, de Dio mem, por ke ni uzu ĝin al la plej granda gloro de Dio kaj al la savo de la homaj animoj.*

**Ho! tiel granda estos la respondeco de tiuj katolikoj, kiuj malestimas aŭ eĉ kontraŭstaras tian armilon, kaj tiel (senintence) malhelpas la revenon de multaj animoj al ilia vera Patrino: la S-ta Eklezio. Ili ĵetas barilon kontraŭ la plenumo de la volo de Kristo, vidi sur la tero „Unu ŝafejon kaj unu Paŝtiston”.**

La Direkcio de E. K.

### Pri kristana Reunuiĝo.

Mi simple ne povas esprimi al vi la sentojn de mia koro, kiel mi respondas al la invito tiel ĝentila, tiel unika, tiel „senprecedenta” de via estimata Prezidanto. Mi venas paroli al vi kiel ano de la Anglikana Eklezio, Eklezio malfeliĉe disigita de la via per la perforto de reĝoj kaj ŝtatministroj sen la konsento (kiel mi kredas) de pastroj

aŭ laikoj. Mi kuraĝas memori al vi, ke tiu eklezio, eĉ en la tempo de tiu-ĉi bedaŭrinda skismo, kaj meze de multaj malĝojoj, neniam ĉesis kreskiĝi kaj plimultiĝi, neniam ĉesis produkti klerajn kaj kapablajn kaj noblajn virojn. Ekzemple en la lasta jarcento ni havis la honoron doni al vi du eminentajn kardinalojn. \*) Tion mi kompreneble ne diras por fanfaroni, sed mi deziras klarigi al vi mian konstantan konvinkon, ke spite ĉio la Anglikana Eklezio estas samtempe tro kara kaj tro potenca por forĵeti ĝin kun malestimo.

Nun mi tre volus paroli pri mia lando kaj mia eklezio: sed hodiaŭ estas mia agrabla devo legi al vi la vortojn de persono multe pli interesa ol mi. La pastro, kies vortojn mi proponas legi, estas tre sindonema Anglikano, kiu estas unu el la estroj de la Roma partio en la Anglikana Eklezio, kaj Prezidanto de la „Societo de S. Tomaso de Kantuario”. Sed antaŭ la legado de lia verketo mi petas permeson diri mallonge tion, kion mi pensas kaj esperas pri la afero.

Unue, mi pensas, ke la nuna stato de la kristanaro estas simple plorinda kaj hontinda, ĉar ĝi estas evidente kontraŭ la esprimita volo de Kristo, kiu preĝis por videbla unueco, kian la mondo povas vidi. Mi estas certa, ke niaj malfeliĉaj dividoj estas unu el la ĉefaj kaŭzoj de nekredco kaj de nereligia ŝtatedukado de infanoj.

Plie, mi opinias, ke nenia unueco estas ebla aŭ utila aŭ dezirinda, kiu ne ampleksas en sia rondo la Rom-katolikan Eklezion, ĉar estus tute ridinde, se ni forigus de nia projekto de reunuiĝu la plej gravan parton de la tuta kristanaro.

Denove, nenia unuiĝo estas ebla aŭ dezirinda, kiu ne estas konstruita sur fundamento de la estinta historio de la Eklezio. Ĉar ni ne devas simple serĉi unuiĝon de la

---

\*) Sendube nia kara samreligiano dirus nun ke, ne Ŝtateklezio, sed la S-ta Spirito donus al tiuj noblaj homoj, pro ilia bonfido, supernaturajn gracojn. La Anglikana Eklezio, kiel simpla homa societo, ne estas kapabla doni al siaj membroj eĉ unu *supernaturan* gracon.

nuna kristanaro, sed ni devas konservi zorge la unuiĝon kun la estinteco. Sed la Roma Seĝo iam estis fakte la centro de nedividita kristanaro. Ĝia historio estas tute senegala. Ĝi sole povas ricevi la fidelecon de la tuta kristanaro. Sekve ĉiuj, kiuj deziras la Unuecon, devas konsenti, ke la Sankta Seĝo estas la sole ebla centro de Kristana Reunuiĝo.

A. H. NANKIVELL.

Mi kore sentas kaj ŝatas la privilegion alparoli al aŭdantaro tiel diversa kaj eminenta kiel la ĉeestanta; kaj mi tuj diros, kion mi kredas esti la ĝusta celo de nia kunveno.

Ni deziras, laŭ mia supozo, fari ion por nin liberigi de tiu malbona sorĉo, per kiu nia reciproka malamikeco ensorĉis nin. Ni volas kuniĝi, per kunfarita penado tiel agi kaj paroli, ke ni forigu tiujn akrajn sentojn, kiuj distenas nin, kaj ĉesigu la kruelajn vortojn, per kiuj ni ĉagrenas unu la alian. Kaj ni simple rifuzos kontentiĝi, ĝis kiam ni tute ĉesigos tiujn malfeliĉajn dividojn, kiuj malĝojigas tiom da maltrankvilaj kaj amantaj animoj inter ni.

Ĉu do tiu-ĉi kunveno devas nur finiĝi en ekĝemo de sentimento, aŭ ĉu ni povas konsenti pri ia komuna komenca punkto, kaj kuntiri niajn pripensojn al ia komuna centro? Por nia unua diskutado mi proponas fari la jenajn antaŭsupozojn; kaj mi ne dubas, ke vi tute konsentos kun mi. Mi antaŭsupozas, ke la sanktaj Skriboj, kiuj estas la komuna tezo de la tuta Kristanaro, neniel pravigos la ekzistadon de multe da kontraŭdirantaj eklezioj, sed male ili parolas al ni pri unu Eklezio, kiu estas la komuna hejmo de la tuta baptita popolo de Dio. De la samaj sanktaj Skriboj ni estas instruitaj, ke povas esti sole unu korpo, ĉar estas sole unu Spirito; ke Judeoj kaj Grekoj estas „kunheredantoj kaj kunmembroj de la sama korpo”; kaj ke ni ĉiuj estas „unu homo en Kristo Jezuo”.

Ni ne bezonas memorigi la nunan aŭdantaron, ke la kristanoj de la unua jarcento konstante zorgis ne sole diri la saman aferon, sed ankaŭ restadi en la sama societo, ĉar ili restis en la kunfrateco de la Apostoloj, same kiel en ilia doktrino, kaj en la partoprenado de la sankta ko-

muniĝo, kaj en la preĝoj. Estas do evidente, ke ia unueco al kiu mankas la komuna partoprenado de la sakramentoj, ne estas sufiĉa por ni.

Sed ekzistas alia fakto de la Biblio kaj de la Eklezia historio, kiun oni ofte forgesas, kaj kiu tre koncernas la problemon, kiun ni penas solvi kaj ĝi estas la jena:

De la komenco mem de la kristana afero oni ĉiam vidas unu videblan kaj gravegan personon antaŭ la ceteraj, ke ĉi tiu videbla Persono estas nia Savinto mem je la unua momento, kiam la Eklezio formiĝas, kaj ĉi tiu videbla persono estas S. Petro je la dua momento, kiam la Eklezio estas formita; kaj ĉi tiu persono estas la Papo poste kiam la Eklezio atingas al plena kreskado.

Tio estas kiel la Bibliaj Skribistoj priskribas la kristanan Societon, kaj tiel oni priskribas ĝin en la historio de la Eklezio. Estas „Jezuo kaj tiuj, kiuj estas kun Li”, en la kvar Evangelioj; „Petro kaj tiuj, kiuj estas kun li”, en la Agoj de la Apostoloj, kaj „la Papo kaj tiuj, kiuj estas kun li” en la parolo de pli novaj tempoj.

Alivorte, neniam estis tempo, kiam ne estas videbla persono prezidanta je kristanaj aferoj.

La principo havi prezidanton ĉe ĉia kunveno estas la kutimo de la komenco, kaj verŝajne daŭros ĝis la fino, kaj kiuj denuncas la papan regadon kiel unuvira teorio, tiuj devas montri al ni kiel sen ĝi oni povas kunteni unu societon.

## I.

Ŝanĝo kaj ĝiaj kondiĉoj.

Sed propono, kiel la nia, kiu supozas ke la estanta stato de aferoj estas malbona, evidente postulas ŝanĝon; kaj estas absurde konsideri Reunuiĝon, se vi rifuzas permesi ŝanĝon.

Kaj denove, escepte se vi pretendas esti senerara,\*)

---

\*) Efektive, la Katolika Eklezio tenas kiel dogmon, ke ĝia Dia fondinto donacis al ĝi la senerarecon pri ĉio kio koncernas la Fidon kaj la Morojn. Pri la disciplino, tamen, la Eklezio povas fari ŝanĝojn, laŭ la tempo, la landoj, kaj la cirkonstancoj. Redakcio de E.K.

estas absurde diri, ke ĉiu alia eklezio devas ŝanĝiĝi, sed la via ne. Do la principon mem ni ne devas konsideri, sed nur la kondiĉojn de ŝanĝo.

1. *Ĉiu Eklezio devas ŝanĝiĝi laŭ sia propra speco.*

Kaj tie ĉi, laŭ mi, ni devas postuli de ĉiu Eklezio, ne ŝanĝon de iu speco ajn, sed sole ŝanĝon laŭ sia propra speco.

Ekzemple, se la Orienta Eklezio cedus al la Roma Seĝo unuaecon laŭ dia rajto, ĝi tiel deklarus tion saman, kion ĝi certe atestis antaŭe, nome, je la konsiliĝo ĉe Efeso en la jaro 431, kaj ree ĉe Kalcedono en la jaro 451. Alivorte, dirante tion, la Orienta Eklezio ŝanĝadus sin laŭ sia propra maniero.

Kaj tiel ankaŭ la Anglikana Eklezio, kiu pretendas ĉu prave aŭ malprave esti la daŭrigado de la antikva Eklezio en Anglujo, povus rekonsideri sian pozicion kaj konfesi unuaecon per dia rajto en Romo hodiaŭ, kiel ĝi certe konfesis en la daŭro de 900 jaroj antaŭ la reformacio. Kaj tio ŝajnas esti pli facila, kiam ni memoras, ke la Eklezio Anglikana konfesas la aŭtoritaton de tiuj samaj konsiliĝoj, kiuj konfesis tiun rajton mem.

Farante tion, ĝi nur diradus ĝuste tion, kion ĝi tiel ofte diris antaŭe; kaj sekve, ĝi ŝanĝadus sin laŭ sia propra speco kaj maniero.

Sed kontraŭe Romo tute ne ŝanĝus sin laŭ sia propra maniero, se ĝi dirus, ke ĝia unuaeco estas nur honora, ĉar diranta tion, Romo dirus tion, kion ĝi antaŭe neniam diris.

Ankoraŭ denove, se Anglujo kontrolata de malbonmora kaj diboĉa reĝo, kaj kontraŭ la konsento de la ekleziaj aŭtoritatoj iniciatis ŝanĝon for de Romo post naŭcent jaroj de komuna vivo, kial Anglujo ne povas iniciati reŝanĝon kaj revenon al Romo post tricent jaroj de aparta vivo?

Kaj tiuj diversaj kondiĉoj estas eĉ pli evidentaj en la afero de Sanktaj Ordonoj. Ĉar Romo neniam konfesis la Anglikanajn Ordonojn; sed Anglujo ĉiam konfesis la Romajn Ordonojn same kiel la siajn.

Tial se oni petus, ke Romo pravigu Anglikanajn Ordonojn,



oni petus ke Romo diru tion, kion ĝi neniam dirus antaŭe; sed se la Anglikana Eklezio en la momento de reunuiĝo estus petita konfesi la Ordonojn de Romo, oni petus, ke ĝi faru tion, kion ĝi ĉiam faris antaŭe: t. e. la ŝanĝo estus laŭ ĝia propra speco.

Fakte, kiel alie vi povos kontentigi la du partiojn, escepte se vi almetos al la okazo ne la principon, kiu estas akceptata sole de unu, sed la principon, kiu jam estas akceptata de ambaŭ?

En tia okazo la Eklezio Anglikana neniel malkonfesus la Anglikanajn Ordonojn; sed ankoraŭ ĝi konfesus la bezonon kontentigi Romon same kiel Anglujon. Kaj la nova generacio de pastroj konos sole la novajn kondiĉojn, kaj ne plu estos embarasata per la pasintaj malfacilaĵoj. Oni do devas distingi la momenton de reunuiĝo de la momentoj, kiuj alkondukas al ĝi; kaj la demando pri ordonoj estos solvita aŭtomate, kiam alvenos la momento de reunuiĝo.

Kaj tiel ankoraŭ unufoje rilate al fundamentaj principoj: eklezio kiu neas senerarecon, neas ĝin rilate al si mem, kaj tial ne povas pretendi esti perfekta. Sed aliflanke en kiu grado eklezio anoncas sian senerarecon, en tiu grado ĝi ne povas eĉ pripensi pri ŝanĝo sen sinkulpigado. Sekve la sintenado de Romo en la entrepreno de unuiĝo devas esti senegala.

## 2. *La Ado de Ŝanĝo.*

Ĉia ŝanĝo flanke de religia korpo devas komenci de individuo. Tio estas grava: ŝanĝo flanke de ia religia korpo dependas de antaŭa preparado, kiu devas komenci en la menso de ia speciala persono: kaj tia viro nepre devas esti denuncata kiel perfidulo je la komenco; eĉ se li estas salutota kiel reformanto en la fino.

Rememorigu al vi la nomojn de Lutero en Germanujo, kaj de Henriko VIII, Cranmer, Cromwell, Latimer kaj Ridley en Anglujo, kaj vi vidos, ke ĉiuj tiuj tenis opiniojn interne de la Rom-Katolika Eklezio, kiuj estis kontraŭ la dogmaro de tiu Eklezio. Ĉiu el tiuj al tiu grado starigis sin kontraŭ la aŭtoritatoj de sia tempo; kaj ĉiu, mi timas,

parolis malbonaĵojn pri altranguloj. Kaj ni hodiaŭ, kiuj nin trovas ekster la Eklezio de Romo, sen imitado de iliaj kontraŭlegaj kaj senordaj procedoj, havas pli bonan rajton proponi ŝanĝon ol ili, tial ke la direkto de nia proponata ŝanĝo estas alproksime de la plimulto da kristanoj, kiam efektive ilia direkto estis for.

Je ĉi tiu punkto ni eltrovas la heroecon de la unuiĝa movado: ĉar, escepte se vi volas kontraŭstari nian Sinjoron, vi devas favori reunuiĝon: kaj escepte se vi volas kontraŭdiri vian racion, vi devas konfesi ke reunuiĝo signifas ŝanĝon: kaj de kiu ajn vidpunkto vi rigardas la aferon, se ia tuta korpo devas ŝanĝiĝi, ĝi devas komenci la ŝanĝon en ia individuo — kiu li povas esti?

Imagu al vi, se vi povas, la Papon komencantan nei la papan senerarecon, je unu fino de sia eklezio; aŭ nuran paroĥestron farantan tion saman je la alia: aŭ ni supozu ke la Anglikana ĉefepiskopo aprobas la Unuaecon de Romo tie ĉi, aŭ la pastro de malgranda paroĥo faras la saman tie! En ĉi tiu aŭ tiu okazo, la malfeliĉulo tuj fariĝos respondinda al la kulpigo pri perfideco.

Kaj tio klarigas kial en ĉi tiu afero, ĉiu atendas por ke iu alia antaŭe sin movu, kaj ĉiu eklezio predikas al aliaj tiun saman evangelion de ŝanĝo, kiun ĝi rifuzas por si mem: simile al la knabo, kiu donis ian suspektan manĝaĵon al sia frato por manĝi, promesante ke, se ĝi ne mortigas lin, li ankaŭ post ne longe partoprenos.

Plie, se individuo devas komenci la ŝanĝadon, ni ja devas serĉi tiun personon sur la cirkumferenco kaj ne apud la centro de la rondo. Unue venas privata opinio; poste publika opinio; unue, la malfaldado de la nova ideo de la individuo, kaj poste la konsiderado de la ideo de la societo: la hontindaĵon diras la unu unue, kaj ripetas la multaj poste: ĉar tia antaŭa procedo estas necesa por pretigi la vojon de tiu granda kaj dezirinda ŝanĝo, kiun ni nomas Reunuiĝo.

## II.

*Efika Hipotezo.*

Nu do, se ni povas konsenti, ke la pozicio de la Roma Eklezio estas senegala kaj tute speciala, ke ĝi kunportas gravan reputacion, per kiu ĝi povas alteni la atenton de la mondo, ke ĝiaj pretendoj estis entute la samaj tra la tuta tempo de ĝia ekzistado, kaj ke la ceteraj eklezioj konfesis tiujn pretendojn iatempe en la estinteco; kial tiuj eklezioj ne povas turni sin denove al Romo kaj konsideri la eblecon refari tian konfeson je la nuna tempo?

Proponante tion, mi ne diras necese, ke Romo estas tute prava, nek ke ĝi ne devas ordigi ion: kontraŭe, mi eĉ ne efektive diras, ke Romo estas prava en ia grado, kio ajn estas mia privata opinio. Sed mia celo estas fari praktika kaj ebla ĉi tiun entreprenon, per la kuntirado de niaj pensoj al unu difinita punkto, t. e. la jena:

Se ni volas ampleksi Romon interne de la limoj de tiu entrepreno, ni devas rigardi ĝin unue, ne laste; kaj ni devas meti ĝin en la unua vico kaj en speciala kaj aparta loko. Ĝuste kiel la esprimo de homa vizaĝo sanĝiĝas kune kun la disvolviĝo de lia karaktero, sen ia ŝanĝo videbliĝanta en lia fizionomio, tiel estas rilate al la Roma Eklezio. Ĝiaj disciplinoj, reguloj kaj kutimoj ja povas ŝanĝiĝi laŭ la bezonoj de tempo kaj cirkonstancoj; ĝia vizaĝo povas esti ŝanĝata senfine per la profundiĝo de ĝia spirita karaktero; sed ĝia ĉefa konturo estas kia ĝi estas; kaj devas daŭri tiel longe kiel la Eklezio mem.

Post tre zorga konsidero de ĉi tiu demando en la daŭro de multaj jaroj, mi konvinkiĝis iom post iom, ke estas multe pli kredinde, ke ni Anglikanoj malkomprenis la pretendojn de Romo, ol ke tiuj pretendoj estis simple neveraj de la komenco. Kaj pro tio, ke efika hipotezo estas necesa al ĉi tiu entrepreno, mi volus fiksi la vagantajn imagojn de la pacigantoj unue al la fakto de nia Savinto, due al Lia apostolo S. Petro, kaj trie al la plej grava persono de la kristana mondo: tiel ke niaj studoj pri tiu demando estu kuntiritaj al tiuj ĉi tri punktoj.

Tiuokaze ni bezonas distingi inter opinio kaj kredo, kaj plue inter la rajto akcepti teorion kaj eĉ konfesi ĝin interne de zorge limigitaj kondiĉoj, kaj aliflanke la rajto instrui ĝin al ĉiu samreligiano: kvankam ĉiaokaze nenia plano por reunuigo povas esti elfarata tute logike. Sed escepte se al kristanoj ekster la Roma Eklezio estas perme-sata racia libereco, kaj escepte se ili povas teni opiniojn ekster la limoj de sia eklezia pozicio, korpa reunuigo estas neatingebla.

Ni ne estas devigitaj antaŭvidi aŭ antaŭdiri la rezultatojn de nia entrepreno. Se la movado elvenas de la Spirito Sankta, Li scios, kiel uzi la plej diversajn materialojn. En la intertempo tiaj oportunoj kiel la nuna ebligas al ni konatigi la ideon de unuiĝo, fondi utilajn precedentojn, kaj okupi favorajn poziciojn, de kiuj oni povas havi pli klaran vidon de la situacio.

Fine, la amika interparolado, kaj respondo de koro al koro, en ĉiuspecoj de manieroj, tiel efikaj kiel delikataj, helpas subfosi la fundamentojn de tiuj obstinaj baroj, kiuj almenaŭ en mia lando estis starigitaj *por* ni, ne *de* ni en la unua tempo, kaj kiuj nur estas subtenitaj pro la malnoblaj bezonoj de partio kaj partianeco.

Mia fervora preĝo, do, estas, ke la amo al Dio estu dis-verŝata en niajn korojn de la Sankta Spirito, kiu estas donita al ni; ke la paco de Dio venu al ni denove; kaj ke dia beno estu sufiĉege kun vi en ĉiuj prikonsiliĝoj de ĉi tiu kongreso.

SPENCER JONES.

(El angla lingvo tradukis A. H. NANKIVELL por la Unua Katolika Esperantista Kongreso).

## ANTAŬ LA PLEJ SANKTA SAKRAMENTO.

1.

Submetiĝe mi aperas  
Antaŭ vi, eterna reĝo;  
La animon, mi esperas,  
Vi blankigu kiel neĝo,  
Ĉar mi pentas ĉiun krimon  
Makulintan la animon.

2.

Mi ja kredas, ke ĉeestas  
En la pano vi, Sinjoro,  
Ĉiam vi kaŝita restas  
Al okul', sed ne al koro.  
Pligrandigu tiun kredon,  
Donas ĝi ĉielheredon.

3.

Mi esperas, ĉar pro savo  
Mia vi suferis morton,  
Mi, ne plu de l' peko sklavo,  
Iros tra ĉielan pordon.  
Plifortigu la esperon,  
Ĉieligas ĝi la teron.

4.

Mi vin amas, plej aminda,  
Dolĉa Jezu', ĉiun horon,  
Kvankam mi ne estas inda,  
Tamen venu en la koron,  
Ekbruligu mian amon,  
Pligrandigu ĝian flamon.

5.

Via graco ĉirkaŭplektu  
Mian kor', ke sin direktu  
Mia plej intima sento  
Al Sanktega Sakramento.

## 6.

Plej amata, bona Jezu',  
Kara Diofil', ne ĉesu  
Loĝi grace en la koro  
Mia ĝis la morta horo.

## 7.

Helpu min en agonio,  
Ĉielpano, vera Dio,  
Gvidu min al via trono,  
Kie logas daŭra krono.

## 8.

Ho, Maria, Dipatrino,  
Petu vian karan filon,  
Ke ne metu, ĝis la fino,  
Inter ni la pek' barilon,  
Ke mi ĝoju kun anĝeloj  
Por eterne en ĉielo.

A. TASBENDER,  
Jagersburg, Germanujo, ĉefinstruisto.

---

## Romo kaj la Papo.

---

Ni eltiras sekvantajn liniojn el episkopa letero de Monsinjoro DUBOURG, ĉefepiskopo de Rennes (Francujo), kiuj rilatas al Romo kaj al Papo.

En la nuna jaro multaj katolikaj esperantistoj partoprenos al nia Pilgrimo; tiuj linioj sendube interesos ilin kaj ankaŭ niajn legantojn nepartoprenontajn.

## I.

. . . . Kiam, trapasante rapide malgajajn kaj melankoliajn ebenaĵojn de la roma kamparo, la lokomotivo, per sia akrasona fajfilo, sciigis, ke ĝi alproksimiĝas celon de sia vojaĝo; kaj tiumomente, sur la ĉiela lazuro, jam form-

iĝas brilegaj kupoloj de famaj bazilikoj, kiuj urbon superelstaras, tiam la kapo senĉapeliĝas, la koro plej rapide batas, la lipoj bruetas preĝon, kaj la manoj, en gesto instinkta, salutas tiun urbon, kiu rememorigas tiom da gloraj memoroj.

Mi ne parolos pri tiuj monumentoj de l' antikva tempo idolana, kiuj antaŭ vi stariĝas je ĉia kurbo de l' strato, kaj kiuj faras Romon, la urbo unika en la mondo. Tamen kia ampleksa temo por interesegega studo estas ĉiuj tiuj antikvaĵoj de l'antikveco, kiu havis sian grandecon kaj belecon: la Forum kun siaj vundegitaj kolonoj, siaj temploj kaj siaj triumfarkaĵoj; la Koliseo elmetante al suno siajn grandegajn proporciojn; la Panteo; la Varmbanejoj de Diokletio kaj de Karakalla; la Palatina Monto kun siaj palacoj kaj siaj rimarkindaj pentraĵoj, kiuj, enterigitaj dum multaj jaroj, nun reaperas al la lumo. Ĉiuj tiuj restaĵoj vin ankaŭ admonas por sonĝi apud ili, kiel antaŭe Marius sonĝis ĉe restaĵoj de Kartago. Oni estas transportita poste du milojn da jaroj; kaj en tiu jarcenta malantaŭeniro, oni vidas, sur tiu „via sacra”, rekovrita de larĝaj platŝtonoj, trapasi tribunojn; trapasas konsuloj, Cesar'oj, sklavaj popoloj, venkitaj reĝoj, fieregaj triumfantoj; starante sur tiuj „rostra”, antikvaj tribunoj ankoraŭ restantaj, oni aŭdas, per la penso, paroladi oratorojn; kaj plej malproksime oni aŭdas poetojn kanti. Ĉiuj tiuj ombroj malaperis. Sola, la „Tiberis”, ĉeestanto de tiom da gloroj kaj da mizeroj, ne ŝanĝis; kaj malgraŭ la novaj digo, kiuj ĝin enpremas; ĉiam ĝi derulas siajn marverdajn akvojn kaj sian dubeflavan ŝlimon, kiel en epoko de Virgilio kaj de Horatio. „Flavum Tiberim”.

Eĉ mi ne parolos pri tiuj kristanaj monumentoj, kiuj surmetis ruinojn de idolanaro, kaj kies ĉiuj ŝtonoj, kiel en grandioza harmonio, kantas la venkon de l' Kristo kaj la triumfon de Lia Eklezio: „Christus vincit, Christus regnat, Christus imperat”.

Tamen kiom da okazaĵoj belaj kaj impresantaj oni povus rakonti pri tiu okupo de l' Romo de la Cesar'oj de unu maleminenta Galilea fiŝkaptiŝto, kiu maltimegis starigi sian humilan kaj mizeran katedron, kontraŭ la ora trono

de imperiestroj, majstroj de tutmondo, kaj kiu, la kruco en mano, venkis en tiu grandega batalo! La memoro de Petro estas vivanta ĉien en Romo. Lia statuo anstataŭis tiun de Jupiter-Capitolinus, kaj la piaj kisoj de intersekvaj generacioj sin paŭzos sur lia bronza piedo kaj finos ĝin eluzi. Super liaj sanktegaj ostoj, super tiu „Konfeso”, apud kiu episkopoj fervore iras preĝi, la frunto malalte, kredo de la fideluloj kaj humana arto, en sia esprimo la plej alta, konstruis bazilikon, kies egala ne estas en la tuta mondo. Nenie, kiel sub la arkaĵoj de tiu senkompara monumento, oni komprenas pli bone la malgrandecon de l' homo kaj la grandecon de Dio. Animo estas kiel neniigita antaŭ la vastegaj proporcioj de tiu navo, multbela ĉefverko de la kristana sento, antaŭ tiuj grandegaj statuoj, antaŭ tiuj marmoraĵoj je brilaj koloroj, antaŭ tiuj mirindaĵoj de l' arto amase metitaj de jarcentoj. Estas majesta figuro de beleco, viveco, senmorteco de la katolika Eklezio. Nenie en la mondo, tiu impreso sin apartigas pli klara, pli taŭga, pli impresiga; kaj, legante tiun skribaĵon, kiu malsupre de la kupolo, flambrilas per oraj literoj longaj de ses futoj, ĝi ŝajnas ke oni vidas la scenon evangelian reĝi kaj denove oni aŭdas la Kriston diri al Simon Bar-Jonas: Jes, vi estas Petro, kaj super tiu ŝtonego mi starigos mian Eklezion; kaj la inferaj fortoj ne superos ĝin.

La Papo estas la videbla estro de l' Eklezio, dum nia Sinjoro, meze en gloro, restas ĝia nevidebla estro.

Do, la Papo estas vera vikario de Jesu-Kristo, Lia vicestro kaj Lia plenrajtigitulo apud la homoj, komisiata por Lin anstataŭi, daŭri Lian entreprenon tra la generacioj kaj al li donitaj estas rajtoj la plej vastaj, kiuj povus esti asignotaj en delegacio al homo. . . . La tempo, en sia rapida forkuro, formortigis ĉion. Ĉirkaŭ ni, ĉio dispartigās, ĉio dispecetigās, ĉio pulvorigās. La homoj, la entreprenoj, la monumentoj ŝanceligās kaj falas, kiel fendigintaj muroj kaj vermoboritaj statuoj. Unu, la Papo venke kontraŭstaras al ĉiuj ventegoj kaj al ĉiuj revolucioj. La homa malico vane teksas kontraŭ li intrigojn la plej sciencajn



kaj la plej malamajn: dank' al la divina protekto, li vidas malsukceson de komplotoj la plej lertaj kaj de intrigoj la plej perfidaj. La malkvieta maro, vane, kontraŭ li, levas siajn ondojn furiozajn, li staradas neŝancebla, trankvila, kaj serena, sur lia granita ŝtonego. *Ruunt et stat.* Kaj, estas ja vera kompatindaĵo vidi tiujn homojn, tiujn pigmeojn, al kiuj historio nenion instruis, ekataki tiun koloson kaj antaŭdiri la baldaŭan morton de la Papeco; ĉar, oni povas certaj esti, ke estos la Papeco, kiu, laŭ nobla penso de LACORDAIRE, ĉeestos iliajn enteriĝojn kaj kiu kantos, antaŭ ilia tombo, la „De Profundis”.

Oni vidis Papojn mortigitajn de mano de la turmentantoj, vangofrapitajn per fera ganto, enfermitajn en karceroj, forekzilitajn, . . . . tute egale!

La Papeco postvivis al ĉiuj tiuj insultegoj, al ĉiuj tiuj insultoj, al ĉiuj tiuj akcidentoj; kaj antaŭ dek jaroj, la 4-a Aŭgusto de la 1903 jaro, la mondo ĉeestis al tiu neforgesebla spektaklo: unu eminenta Papo, kiu nomiĝis LEONO XIII, ĵus plenigis vivtempon kaj mortis; kaj unu alia Papo, kiu antaŭ historio, havos nomon de PIO X, deveninta el konscienco kaj el libera elekto de Kardinaloj kunigitaj, ekaperis sur horizonto de l' Eklezio; kaj la popolo, amasigita sur la vastega placo de Sankta Petro, povis ĵeti al ĉiuj eĥoj de l' Eterna urbo sian entuziasman aklamon: „La Papo mortis! Vivu la Papo!”

Esperantigis:

MAX ROUB.

---

## „DIO GEOMETRIAS”

(*Poemo ricevinta „honoran mencion” ĉe la Oka Kongreso*).

Diradis Plato, „Di' geometrias!”

Sed vi, amiko mia, tion neas;

Laŭ via diro li ja poezias,

Belaĵojn kaj miraĵojn ĉie kreas.

En muskoj kaj filikoj, en la floroj,  
 Murmuro de l' rivero rapidanta,  
 En sunleviĝoj, sunsubiraj gloroj,  
 Freŝiga pluvo ritme faladanta.

En dolĉa birdokant' el la arbaro,  
 Sur la ĉiel' semitaj steloj oraj,  
 Ludemaj ondoj sur la vasta maro,  
 Koraloj strangaj, konkoj multkoloraj.

Sed Plato estas nepre senerara,  
 Dirante ke geometrias Dio;  
 Jen! Ordo estas leĝ' ĉiela, tera:  
 Por taŭga esti, ĝin bezonas ĉio.

Detruu ordon, kaj ĥaoso iĝos;  
 Senforma, senbeleca ĉio estos.  
 Matematiko tute se foriĝos,  
 Nenio vera, bona, bela restos.

Ĉu vi ne opinias ke liniojn  
 Regulajn, nombrojn amas la Naturo?  
 Ĝuste elformas ŝi la florfoliojn,  
 Nombrante ilin zorge laŭ mezuro.

Rigardu la abelojn konstruantajn  
 Ĉeleton ĉiun laŭ rigida leĝo;  
 Kristalojn vidu en la rok' kuŝantaj,  
 Brilantaj en la ĵus falinta neĝo.

En ĉielarko kaj ĵetita ŝtono  
 Kurbojn precizajn oni ĉiam vidas;  
 Planedoj, eĉ la sun' sur ora trono,  
 Laŭorde siajn kursojn trarapidas.

Koloroj ankaŭ sur matematiko,  
 El la etero nombroj, ja fondiĝas;  
 Baze la poezio, la muziko,  
 Ritmo,—regula nur' mezur' fariĝas.

Jes, vere estas, poezias Dio,  
 Sed por ke Dio povu poezii,  
 Ĉu vi ne vidas ĉiam ke en ĉio  
 Nepre deviĝas li geometrii?

(*El Amerika Esperantisto.*)

CELIA DOERNER.

Aprilo 1913.

## Katolika Vivo Ĉiulanda.

### Nokto en la S-ta Tombo.

Nokto pasita en la Sanktega Tombo certe estas la plej kara memoro al fidela kristano, kiu vizitis sanktan Landon fervorema je kredo kaj pieco.

Efektive estas viva pruvo, ke li ŝategas ĉi tiun memor-aĵon pli ol ĉiuj spektakloj aŭ noktaj festenoj kiujn li jam vidis.

Kiam Lia Imperiestra Moŝto Francisko Jozefo vizitis Palestinon dum la jaro 1869, li donis al Jerusalema urbo la plej edifan ekzemplon de vera kaj pia katoliko, pasinte nokton en la Baziliko de la Sanktega Tombo de Nia Dia Savinto, preĝante kaj ricevante la S-an Komunion apud la S-ta Tombo. Malgranda marmora tabulo ĉe la manĝejo, kie li dufoje vespermanĝis kune kun la malriĉaj Franciskanoj memorigas ĉi tiun okazon.

Oni povas ricevi tiun-ĉi specialan favoron, petante ĝin al P-ro Sekretario de la Sankta Lando, kiu loĝas en la monaĥejo de S-ta Savinto (St. Salvatore), kiu per letero rekomendas la pilgrimanton al la superulo de la Sankta Tombo, por ke tiu-ĉi afable gastigu lin kaj donu al li la necesajn komfortaĵojn.

Eble ne ĉiuj scias, ke la S-ta Tombo estas propraĵo de Turka gubernaro, kaj el nememorebla tempo du mohamedanaj familioj rajtas fermi kaj malfermi la pordon du fojojn ĉiutage; pro tio la kristanaj familioj, kiuj loĝas en la sanktejo, pagas fiksitan kotizaĵon, kiu ordinare estas 2 Sm. (5 frs.) pro ĉiu malfermigo, tamen tiu-ĉi kotizaĵo

dum la festaj tagoj povas esti altigita ĝis 10 Sm., 20 Sm., kaj ankaŭ 40 Sm. Tiu-ĉi aranĝo (t. e. malfermo de la pordo post oficiala peto) ekzistas nur de post la Krimea militado, ĉar antaŭe la kristanoj dependis de la volo de la pordistoj, kiuj kelkfoje demandis por unu malfermo de la pordo ĝis 200 Sm. kaj pli; kaj tiel la pordo restadis fermita dum longa tempo kaj multnombro da malriĉaj pilgrimantoj devis atendi tri aŭ kvar monatojn, ĝis kiam iu riĉa kristano pagis la postulitan kotizon kaj ebligis ilin eniri en la sanktejon, kiel siaj kunuloj. Kvarono da horo antaŭ la fermigo la pordisto batas per ferilo la pordon kaj tiuj, kiuj volas foriri, tuje forlasas la Bazilikon kaj tiuj, kiuj volas pasigi la nokton en la sanktejo, tuj eniras; tiam unu el la pordistoj bone riglas la pordon kaj la alia konservas ĉe si la ŝlosilon.

Dum la tago la pordistoj staras kuŝitaj sur divano apud la Kalvario, observante la enirantojn kaj forirantojn, trinkante kafon kaj fumante cigaredojn tiel same kvazaŭ ili estus en propra hejmo.

Apenaŭ la pilgrimanto estas enirinta en la sanktejon, kiu estas plena je mistera mallumo, nur lumigita per kelkaj koloritaj lampetoj, jen lia koro ekpleniĝas je sankta timo kaj pieco pro la loka sankteco. Dum li antaŭeniras, li postlasas la Kalvarion kaj la ŝmiran ŝtonon, li eniras inter la koloj, kiuj apogas la kupolon, kaj sub la arkoj, kiuj ĉirkaŭiras ĝin, baldaŭ li trovos sin apud la monumento de la Reĝo de la Reĝoj. Radio de ena lumo invitas lin tien eniri. Li estas nur sola en la plej sankta loko de la tuta mondo, kaj neniu distras lin. Li surgenuas kaj kisas la marmoran ŝtonon, kiu kovras la Tombon, en kiu estis entombigita nia Savinto. Li, plena je sankta emocio, ekkonsideras, ke ĉi tie efektiviĝis la plej granda mistero de nia Kredo, ke ĉi tie Nia Savinto venkis la morton kaj inferon per Sia glora reviviĝo en tiu unua Paska mateno kaj malfermis al ni la ĉielajn pordojn. Ĉi tie la pilgrimanto elvidas la gravecon de tiu-ĉi granda mistero, per kiu li estas savita; ĉar se Kristo ne estus reviviĝinta, vana, diras l'apostolo, estus nia Kredo.

Li ĝuas havante tiun-ĉi favoron t. e. genufleksante ĉe tiu-ĉi sanktejo, kiun Reĝoj kaj Imperiestroj deziregis vidi kaj ne vidis; li memoras pri tiuj unuaj kristanoj, unualoke la Sankta Virgulino Dipatrino, la sanktaj Apostoloj, k.t.p. kiuj surgenuis ĉi tie dum la centjaroj; kiom da larmoj de amo kaj pieco ĉi tie fluis! Kiom da kisoj estis premitaj sur tiu-ĉi Tombo! Kiom da agoj de pentofarado estis surirantaj de ĉi tie al la ĉielo! Kiom da animoj estis sanktigitaj ĉi tie! Jes, la bona pilgrimanto elvidas antaŭ siaj okuloj multnombran aron da fideluloj dum dudek centjaroj. Li elvidas ĉiujn la animojn, kiuj vizitis tiun-ĉi sanktan lokon, ĉiujn la piulojn, kiuj ĉi tie preĝis, ĉiujn krucsignantojn komencante de Gofredo de Buglione, Ricardo Leona Koro kaj mil aliajn personojn piajn kaj respektindajn, kiuj ĉi tie adoris Nian Dian Savinton.

La pilgrimanto, tute ŝanĝita en alia homo, lasas la S-tan Tombon, kaj la Franciskana monaĥo, kiu zorgas la pilgrimantojn, akompanas lin en silentan ĉambreton, kie li ripozas. Ĝi estas malgranda ĉambro sen ia meblo; ĝi enhavas nur malriĉan liton, genufleksejon, krucifikson kaj kandelon. La nokta kvieteco kaj la taga laceco alportas al li komfortan ripozon, sed eĉ la eĥo de la nokta sonorilo alvenas al liaj oreloj kiam la sakristana monaĥo ĉirkaŭiras la monaĥejon, ekvokante la fratojn al la meznokta Diservo. El la malgrandaj ĉambroj li vidas foriri silentajn figurojn kun longaj barboj, irante senprokraste al la Kapelo de la Aperio, kie oni kantas la tagan Dioficon, al kiu sekvas tiu ankaŭ de la Sankta Virgulino.

Al nia Pilgrimanto estas montrata speciala loko, kaj li ĉeestas tutan la Diservon; kaj tiel, dum la mondo amuzas sin en dancoj, diboĉoj kaj teatraj spektakloj, aŭ profunde dormas, tiuj fratoj preĝadas pro Lia mizerikordo, diskontante la kulpojn de la homaro, kiu vokas venĝon al la ĉielo. Jes, se ne estus la preĝadoj de tiuj piuloj, kiuj oferas sin viktimoj por ni, mizeraj mortemuloj, la Dia venĝo eble estus jam frapanta la pekulojn, kiuj dum ĉi tiu horo, profitante de la nokta mallumeco, iras dronante sin en brutaj pasioj.

Dum la Diservo la pilgrimanto observas strangajn vizitantojn. Jen aperas juna greka Diakono kun longa malliga hararo, balancanta inter siaj manoj la incensilon por honori la kolonon, al kiu Nia Savinto estis ligita kaj kiu estas pie konservata en la maldekstra altaro. Poste armena Diakono; li estas vestita je longa ornamita vesto kun arĝenta krono en kapo. Pli poste alia Kopta Diakono, kaj fine granda amaso da Rusaj pilgrimantoj, kiuj multfoje klinigas sin kvazaŭ ĝis tero, tuŝante la kolonon kun bastono kaj respektplene kisante ĝin. Tiel rapide la tempo pasas dum la Diservo, kaj la kanto de la *Benediktus* alproksimiĝas. Nun la patroj vestas sin per la sakrovestoj kaj ekkantas la Zaharian himnon; ĉiuj leviĝas kaj procesie marŝas, mantenance lumigitan kandelon, alternante la Zaharian kanton, akompanatan per la orgena sono, paŝe paŝe kontraŭiras apud la Sanktega Tombo, kie estas incensata la S-ta Tombo; oni ree turnas al la Sakramenta Kapelo. Nenio estas pli kortuŝiga kaj emociiga ol tiu nokta procesio en la sanktejo. Tiu muziko suprenirigas l'animon al Dio, la emocio premegas la pilgrimanton.

La katolika Diservo estas finita, sed la pilgrimanto ne ŝatas dormi. Li venis ĉi tien por vidi kaj preĝi. Li vizitas la haltejon, kie oni metis Jezuon dum la perfiduloj preparis la Krucon sur Kalvario, li malsupreniras la kapelon de Sankta Heleno, tiel nomita ĉar ĝi estis konstruita de tiu ĉi S-ta Imperiestrino, eniras la kapelon, kie oni trovis la Sanktegan Krucon. Malproksime la pilgrimanto sentas dolĉajn melodiojn; estas la kanto de la Ruslandanoj, kiuj dum la nokto fervore kantas kaj preĝas sur Kalvario. Kvankam ili ne estas en la vera Eklezio, tamen nia bona Savinto ne malŝatas kortuŝeme gvardi tiun-ĉi simplan kaj bonkoran popolon, kiu estus la plej fervorema inter la katolikoj, se ĝia episkoparo kaj pastraro ne estus tenante ĝin en eraro.

Iom da tempo, kaj la Ruslandanoj forlasas la Kalvarion, por ĉeesti al la Grekoskismatika Meso, kaj nia pilgrimanto restas nur sola precize ĉe la sama loko, kie okazis la plej granda tragedio de la mondo. Li genufleksas ĉe la

loko, en kiu oni plantis la krucon kun Jezuo najlita sur ĝi kaj kie la Savinto de la mondo tiel kruele finis pro nian morteman vivon.

La krucifiksigo pasas antaŭ okuloj kiel vizio. Li sentas la insultojn kaj la malrespektojn de la popolamaso, kaj la vortojn de Kristo mortanta; li vidas la Dipatrinon sub la Kruco, ŝi ĉeestas la agonion de la Dia Filo. Nun la pilgrimanto emocie kisas tiun sanktan monton, kaj fervore preĝas, por ke estu donota al li la bonan kaj sanktan morton. Li memoras ĉiujn siajn karulojn malproksimajn, rekomendante ilin al la Dia kompatemo. Poste li turnas sin al Maria. La Patrino de la doloroj havas sur kalvario altaron, kie Ŝi ĉirkaŭprenas inter siaj brakoj la senaniman korpon de sia filo. Malnova statuo de la dolora Virgulino kun larmantaj okuloj ŝajnas diri al pilgrimanto: *O vos omnes qui transitis per viam, attendite et videte, si est dolor sicut dolor meus.* (Jerem. Lam. 1. 12.) Kiom da kristanoj kaj ankaŭ katolikoj estas, kiuj havas ĉiujn bonokazojn kaj facilecojn por viziti la Sanktan Landon; sed ili pro manko de kredo kaj fervoro preferas vojaĝi en aliaj landoj anstataŭ iri preĝante sur Kalvarion apud la piedoj de la Krucifikso, kaj apud la Tombo de Nia Savinto.

Jam estas matene kaj la suno ekbriletas la pintojn de la montoj. La pilgrimanto ree iras ĉe la Sanktega Tombo por ĉeesti la unuan katolikan meson, kiun oni diras post la Greka, kaj Armena skismatika meso. Jam kelkaj gefid-eluloj troviĝas surgenuantaj en la anĝela Kapelo. El tie oni povas observi la pastron, oferante la sanktegan sakrificon de la Meso sur la Tombo mem de nia Savinto. Do tie la pilgrimanto sentas la vortojn: *Resurrexit! Alleluja!* Estas la Meso de la Paskofesto, kiun ĉi tie oni diras ĉiutage dum la tuta jaro. Lia koro pleniĝas je sankta ĝojo, kiam li respektoplene ricevas la sanktan Komunion en sia brusto. Li foriras el tiu sanktejo kun kiom da bonaj proponoj kaj, transforirante inter tiuj gigantaj arkadoj, ŝajnas al li, ke li sentas dolĉan voĉon dirante: *Pax tecum, memento Jerusalem.*

P-ro Ugolino MERCIECA, O. F. M.

Jerusalemo, 23 de Marto 1913.

### **La Nacia Kongreso de la Katolika Junularo Franca.**

La Katolika Asocio de la Franca Junularo organizis sian jaran nacian kongreson de tiu jaro en la ĉefa urbo de Normandlando: Caen. Pli da kvin miloj el siaj anoj ĉeestis al tiu kongreso, kiun prezidis la episkopoj de Bayeux, Coutances, Siez, Evreux, Le Mans.

La Kongreso okazis la 18, 19, 20 de Aprilo. Estis studaj kunsidoj, publikaj paroladoj, la vendredon kaj la sabaton.

Sed la ĉefa tago estis la dimanĉo. Tiu grandioza tago komencis per meso nekantata, dum kiu pli ol du miloj da kongresanoj komuniĝis. Poste okazis: kunveno ĉe la cirko, plena ĝis la arkaĵo; solena meso en la preĝejo Sankta Stefano; festeno, kaj fine ferma kunsido, ĉe kiu la eminentuloj de la katolika movado en Francujo paroladis.

Rekuraĝiga tago, kiu konigas al la malamikoj de nia Kredo, ke la franca junularo estas ankoraŭ fidela al la kristana religio, al la Katolika Kredo.

Max ROUB.

---

### **OZANAM.**

La 25, 26, 27 de aprilo okazis en Parizo la grandiozaj centjarfestoj honore al Frederic OZANAM, tiu apostolo, kiu mortis, kvardekjaraĝa, lacekonsumita per laboro kaj ne kompletiginta sian verkon historian kaj apologian, sed kies vivo tiel plene plidaŭriĝas en la nuna tempo per miraklo taŭgatempa: la mirinda kreskado de la konferencoj de Sankta Vincento de Paŭlo.

L. E. Kardinalo VANNUTELLI prezidis tiujn festojn kiel Legato de la Sankta Seĝo. Multnombraj prelatoj, episkopoj: L. L. E. E. Kardinaloj AMETTE, ĉefepiskopo de Parizo; LUÇON, ĉefepiskopo de Reims; N. N. S. S. CHESNELONG, ĉefepiskopo de Sens; HERSCHER, ĉefepiskopo de Laodicée, MONNIER, ĉefepiskopo de Troyes, k.t.p. ĉeestis tiujn festojn.

Kunvenoj kaj religiaj diservoj, rezervitaj al kunfratoj de la konferencoj de Sankta Vincento de Paŭlo, okazis vendredon kaj sabaton ĉe Katolika Instituto kaj ĉe Preĝejo de Karmelitoj, kie estas la tombejo de Ozanam.



Dimanĉon matene, ĉe la nacia baziliko de Sankta Koro de Jezuo, je la oka, Kardinalo VANNUTELLI kantis meson, post kiu multaj ĉeestantoj komuniĝis. Okaze de tiu ceremonio la sonorilego, nomita „La Savoyarde”, aŭdiĝis.

Sed la ĉefa kaj la ferma ceremonio okazis je la kvara vespere ĉe la antikva baziliko de Nia Sinjorino de Parizo. Tiu grandega preĝejo estis tro eta por enhavi la grandan popolamason, kiu sin premis en ĝi.

Post la „Kredo”, kantita de 10.000 homoj, pastro JANVIER, dominikano, revokis elokvente la vivon tutplenan de karitato de OZANAM. Li revokis la epokon maltrankvilan, kiam Ozanam vivadis, liajn klopodojn por kontraŭbatali la religian indiferentecon de liaj nuntempuloj, fine liajn fondojn: la Konferencoj de Sankta Vincento de Paŭlo kaj la Predikadoj de Nia Sinjorino de Parizo.

La Beno de l' Sanktega Sakramento malfermis tiun neforgeseblan ceremonion, al kiu mi feliĉe ĉeestis.

Je sia alveno kaj ankaŭ je sia foriro de la Katedralo, la Papa Legato aklamita estis de la „bona popolo” de Parizo per la krioj: „Vivu la Papo, vivu la Legato!”.

Max ROUB.

---

## Kroniko de I. K. U. E.

---

### **Nederlanda Katolika Ligo Esperantista: „Nederlanda Katoliko”.**

Dimanĉon la 20-an de Aprilo okazis la 4-a jarkunveno de „Nederlanda Katoliko” en la antikva urbo „'s-Hertogenbosch”. Tiu-ĉi urbo kuŝas en la suda parto de nia lando kaj estas la ĉefurbo de la provinco „Nord-Brabanto”. Ĝi estas la sidejo de Episkopo kaj Provincestro. Ordinare ĝi estas nomata simple „Den Bosch”. Ĝi posedas tre fervoran Katolikan Esperantistan klubon. Tial la ĉefestraro de „Nederlanda Katoliko” elektis tiun-ĉi urbon por festi la 4-an jarkunvenon. La Bosĥa grupo estis invitita, organizi tiun ĉi tagon tiamaniere, ke ĝi donus al la vizitantoj krom la kunveno ankaŭ kelkajn agrablajn distraĵojn. Bonvoleme la

Bosĥa grupo prenis sur sin tiun-ĉi taskon, kaj kunmetis belan programon, kiu jam antaŭe akiris multe da aprobo, kaj pri ĝi la samideanoj estis tre kontentegaj.

*La Akcepto.*

Frumatene la riprezentantoj de la diversaj grupoj akompanataj je multaj membroj alvenis. Kompreneble la provinco Nord-Brabanto liveris la plej multajn, sed ankaŭ el la nordaj regionoj la Liganoj are alvenis. Al la stacidomo la samideanoj estis ricevitaj de kelkaj membroj de la Bosĥa grupo. Ankaŭ grupo da Liganoj el Boxtel (Bokstelo), kiuj bicikle estis alvenintaj, atendis sur la perono la alvenon de la samideanoj. La atendtempon ili mallongigis kaj gajigis per esperantaj kantoj.

*La Sankta Meso.*

Je la deka la Liganoj (pli ol 200) are iris al la bela preĝejo de la Rev. Fratinoj de „Mariĕnburg” por ĉeesti la Sanktan Meson. La Rev. Moŝto Pastro Titus Brandsma, profesoro al la Karmelita monaĥejo en Oss, oferis la S-tan Meson por la vivantaj kaj mortintaj Liganoj.

Post la unua Evangelio, Pastro L. Moonen, vikario en Uden, eklezia konsilanto de la Esperantista grupo „Udeno”, predikis esperante pri la vortoj el la Evangelio: „Ĉiu bona donaĵo kaj ĉiu donaco perfekta desupra estas.” La predikisto klarigis, ke Dio, vidinte la malpacon, la malamikecon inter la homaro, sendis Sian Filon teren por instrui, ke ni havas saman destinon kaj devenon, ke ne ekzistas diferenco inter Grekoj kaj Romanoj, ke ni havas unu urbon en la Ĉielo, unu socion sur la tero. Ke ni estas unu popolo, de kiu Li estas la granda Reĝo kaj Juĝanto. Li fondis Sian Eklezion, kiu kiel arbego ombra la tutan mondon. Tiu-ĉi Eklezio ĉiam dum la jarcentoj plenumis sian devon, ĉiam predikis amon kaj instigis siajn infanojn konservi la karegan heredaĵon: la fratan amon; la signo al kiu oni rekonas la veran kristanon. Nenia rimedo estas por ĝi tro multekosta; nenia laboro tro peza, nenia ofero tro granda. Tial benis kaj benas la Pontifiko de Kristo la Esperanto-movadon kiel bonegan rimedon por kolektigi

la Kristanojn, por ke ili estu unu ŝafaro kaj unu pastoro. Tial ni devas uzi tiun rimedon, nenian penon konsideri tro granda kaj neniam kontraŭagadon timi.

*La Lunĉo.*

Post la fino de la S-ta Meso la samideanoj grandparte iris al la hotelo „Central”, kie ili ĝuis bonan lunĉon. Antaŭe la prezidanto de la Bosĥa grupo, S-ro J. PASTOOR, la energia organizinto de la jarkunventago, bonvenigis la samreligianojn per koraj vortoj. Jam nun regis la plej bona gajeco.

*La vizito al la Katedralo.*

Je la dekdua la Esperantistoj unuiĝis en la Katedralo kaj alportis unue saluton al nia Sankta Patrino Maria. Poste oni rigardis la preĝejon sub gvido de S-ro L. P. M. van VALKENBURG, ĉefinspektoro de renovigo de la Katedralo, kiu klare klarigis la multajn artaĵojn kaj historiajn rimarkindaĵojn. Subite, dum la rondirado, oni ekaŭdis la belajn sonojn de la famega orgeno, kiu estis ludata speciale por la Esperantistoj, de S-ro P. KALLEBACH, la konata artisto. Dum duono da horo li ludis majstre, kaj la aŭdantaro estis ravita pro tiu-ĉi imponiganta ludo.

*La vizito al la „Chicago Bioskopo”.*

Dum la Ligestraro kunvenis en „Casino”, kunveno, kiu ĉiam antaŭiras la jarkunvenon, la Esperantistoj iris al la „Chicago Bioskopo”, kie por ili estis prezentata speciala scenaĵo de lumbildoj pri la Esperanto-movado.

Unue aperis la bildo de la aŭtoro de Esperanto: D-ro Zamenhof, poste nia majstro ĉirkaŭata de la plej eminentaj Esperantistoj. Kompreneble, tiuj-ĉi bildoj estis salutataj per aplaŭdego kaj kiam la fortepiano aŭdigis „La Espero”, la ĉeestantoj kune kantis nian „popolhimnon”. Poste komenciĝis serio da lumbildoj de personoj plej konataj: Lia Papa Moŝto Pio X-a kaj Lia elparolo: „Esperanto havas grandan estontecon”; Pastro Richardson, prezidanto de I. K. U. E.; Pastro Poell, prezidanto de „Nederlanda Katoliko”; S-ro W. Lutkie, kiu antaŭpuŝis la Katolikan Esperantan movadon en nia Lando; Profesoro P-ro H. Linnebank,

nia fama oratoro; D-ro J. N. J. Smulders, ĉefredaktoro de „Espero Katolika; S-ro Dreves Uiterdijk, la unua Nederlanda pioniro; S-ro D. F. Romein, honor-membro de la Holanda Societo Esperantista „La Estonto Estas Nia”; Monsinjoro M. Schleijer, aŭtoro de „Volapük” k.t.p., k.t.p.

Poste sekvis bildoj de la Katolikaj Kongresoj en Parizo, Hago kaj Budapesto kaj bildoj de diversaj kunvenoj de Nederlandaj Esperantistoj. Ankaŭ bildoj de grupo el la unuaj Esperantistoj antaŭ 25 jaroj, Japana grupo kaj diversaj konataj eksterlandaj Esperantistoj aperis sur la tuko.

Plie sekvis serio da lumbildoj pri la ĝeneralaj kongresoj kaj manovroj de la Ruĝa Kruco. Fine aperis filmo pri la Antverpena Kongreso; precipe la vidaĵo de ĉirkaŭ 2000 Kongresistoj el 30 diversaj nacioj sur la ornamitaj boatoj por fari ekskurson sur la Schelde, vekis grandan entuziasmon.

#### *La Jarkunveno.*

Antaŭ ol la jarkunveno komenciĝis, la samideanoj estis fotografataj sur la enkorto de „Casino”. La salono estis bele ornamita per flagoj, kaj sur altaĵo inter plantaĵoj estis metitaj grandaj portretoj de D-ro Zamenhof, P-ro Poell, P-ro Linnebank kaj S-ro D. Uiterdijk, kiuj estis pentritaj de la famega artpentrista firmo H. Bogaerts kaj Kio el Boxtel. Plie sin trovis en la salono bonega kolekto da Esperantaĵoj.

La kunveno komenciĝis je la tria kaj post la malfermo per la Kristana saluto, la prezidanto de la Bosĥa grupo S-ro J. Pastoor bonvenigis la samideanojn. Li memorigis ke dum la kvarjara ekzistado de la Ligo la nombro da anoj ĉiam pligrandiĝis kaj opiniis ke la bona gvido de la ĉefestraro kaŭzis tiun sukceson. Interrompita de aplaŭdo li skizis la meritojn de la ĉefestraranoj.

Poste la Ligprezidanto P-ro Poell bonvenigis la ĉeestantojn, precipe Monsinjorojn Diepen kaj Prinsen, kiuj honoris la kunsidon per sia ĉeesto. Plie li bonvenigis S-ron D. F. Romein, la oficialan riprezentanton de la Holanda Societo Esperantista „La Estonto Estas Nia”. La parolisto memorigis, ke S-ro Romein estas unu el la unuaj pioniroj de la Esperanto-movado en nia lando, kaj ke li estis multajn

jarojn prezidanto de L. E. E. N., kiu lin honoris per la honor-membreco. Longdaŭra aplaŭdo sekvis post tiuj ĉi vortoj.

La ĉefsekretario legis sian jarraporton el kiu oni sciigis ke du novaj grupoj estis starigitaj kaj la nombro de anoj pligrandiĝis de 736 ĝis 831. Tiuj ĉi ciferoj koncernis la staton je la 1-a Januaro, post tiu ĉi dato ankoraŭ nova grupo en Breda fondiĝis, kiu kalkulas 90 membrojn. La jarraporto skizis la laboraĵojn kaj utilon de la diversaj komisionoj. La membroj de la komisiono por la propagando faris paroladojn en 13 diversaj lokoj. La komisiono por la presaro senĉese forsendis artikolojn pri la Esperantomovado al la Katolika gazetaro kaj tiamaniere prilaboris la publikan opinion. Plie la raporto finiĝis per forta instigo por partopreni al la grandioza Esperanto-tago, tenota la 6-an de Julio en Tilburg.

La kasisto S-ro Moŝto Th. C. van Erp estis malhelpita ĉeesti pro malsano. Tamen li ensendis sian raporton, kiu donis sufiĉe kontentigajn komunikaĵojn pri la financa stato.

La prezidanto dankis la ĉefsekretarion kaj la kasiston por iliaj multaj laboraĵoj faritaj dum la pasinta jaro kaj komunikis ke la Ligestraro reelektis la ĉefestraron.

La dua sekretario P. v. Linnebank sciigis, ke li faris enketon pri la stato de Esperanto-instruado en la Katolikaj Instruejoj. Li forsendis 159 cirkulerojn al seminarioj, gimnazioj kaj kolegioj. El la ricevitaj respondoj montriĝis, ke la instruprogramo estas tro ŝarĝita kaj tial la estroj ne povas oficiale enkonduki Esperanton. Tamen en kelkaj instruejoj oni instruas Esperanton dum la libertempoj.

Poste oni paŭzis, dume komisiono ekzamenis la rajtigdokumentojn de grupaj riprezentantoj, kaj post la remalfermo de la kunsido, sciigis, ke 14 grupoj sendis riprezentanton.

La diversaj proponoj, kiuj nun estis pritraktataj koncernis la internan regularon; la enkondukon de Esperanto inter la patronejoj; kaj la starigon de legrondoj.

Pro la tro longdaŭraj diskutoj nur la riprezentantoj kun la ĉefestraro daŭrigis la kunsidon; dume la samideanoj vizitis

la belegan kunsidejon de la Provinca Konsilantaro kaj la urbdomon.

*La vizito al la urbdomo.*

S-ro D. Hermsen, artpentristo, klarigis al la Esperantistoj la pentraĵojn en la vestiblo kaj rakontis historiajn interesaĵojn pri la griza Dukurbo, precipe montrante la fakton, ke ĝi estis konstruita dum la periodo de la krucmilitoj. Dum la vizito al la supraj salonoj S-ro V. Cleerdin rakontis la historion de la urbdomo. Li klarigis kial la arĥitekturo de la urbdomo diferencas de la arĥitekturo de la Katedralo. Poste oni malsupreniris en la antaŭ mallonga tempo trovitan kelon, kie estus konservataj la antikvaj turmentegiloj.

*La komuna tagmanĝo.*

Je la sesa unuiĝis la estraranoj kun parto da samideanoj — ĉirkaŭ 80 personoj — por la komuna tagmanĝo en hotelo „Noord-Brabant”. La Bosĥa grupo zorgis atente ke dum la Tagmanĝo kelkaj muzikistoj plialtigu la gajecon kaj societemecon. Ankaŭ fraŭlinĥoro tre meritplene kantis kelkajn esperantajn kantaĵojn. Tre agrabla surprizo estis, ke al ĉiuj sinjorinoj kaj fraŭlinoj oni oferis bukedeton. Kompreneble la tosto kaj kantoj sekvis unu la aliajn seninterrompe. S-ro Romein unue tostis kaj deklaris ke li kvankam ne samreligiano alte ŝatas la altan celon de la Katolikaj Esperantistoj kaj dankis la ĉefestraron por la invito sendita al „L. E. E. N.”, kiun li riprezentis. La tagmanĝo finiĝis tre festene, societeme.

*La publika koncerto.*

Je speciala permeso de la urbestro la urba orkestro donis publikan koncerton, okaze de nia jarkunveno. La koncerto altiris grandan popolamason. „Nederlanda Katoliko” povas esti kontenta pri la farita propagando kaj la Bosĥa grupo meritas laŭdegon por la bonega aranĝo.

H. B. VAN ZWET,

Ĉefsekretario de „Nederlanda Katoliko”.

Utrecht, 1-an de Majo 1913.

*Helmond.* Nia konata oratoro P-ro Linnebank faris paroladon en tiu ĉi urbo ĵaŭdon la 24-an de Aprilo. La talentplena parolisto pritraktis la temon: „la irado de Esperanto tra la mondo”. Per trafaj ekzemploj li pruvis la grandan utilon de nia helplingo. Poste li rakontis siajn impresojn pri „Nia Dua”. Per elokventaj vortoj li konvinkis la aŭdantaron pri la utileco de Esperanto. Post la parolado grupo fondiĝis; 14 personoj membriĝis. La grupo aliĝos la „Nederlanda Katoliko”.  
Z.

### SCIIGOJ DE LA REDAKCIO.

*La adreso de la Kasistino de la Roma Pilgrimo* estas: F-ino M. LARROCHE, 55 rue de Vaugirard, Paris (en la Aprila numero p. 122 ni presigis erare 11 anstataŭ 55.)

Oni bonvolu ankaŭ korekti liniojn 7 kaj 6, p. 109 mal-supre, jene: . . . plantado de vere vivanta arbeto kun radikoj kaj branĉoj kreskiĝontaj, kiu la tutan jaron estas atente prizorgata, kiu printempon verdiĝas, k. t. p.

Pri „*festlibro*” okaze de 10-jara ekzistado de E. K. (Vidu Aprilo p. 127) mi sciigas, ke tro malmultaj ŝajnas interesiĝi pri la afero. La *festlibro* do *ne* eldoniĝos. Eble ni donos *festnumeron* de E. K. en Oktobro; tio dependas de sufiĉe grava kunlaboro al ĝi; se ne, ni preterpasigos la fakton nemenciite kaj eldonos ordinaran Oktobro-numeron. Ni dankas tiujn, kiuj promesis kunlabori al la nun *ne* eldonota *festlibro*, nome. P-ro RICHARDSON (Belg.), P-ro POELL (Nederl.), Max ROUB (Franc.), F-ino HORNUNG (Germ.), S-ro RAVANELL (Ital.), S-ro WESELY (Aŭstr.) kaj S-ro SCHENDELER (Nederl.).

Ne-oficiale mi atentigas la Akciulojn al Art. 19 kaj 20 de Statutoj de la *Akcia Societo „Espero Katolika*”. La agendo de la ĝenerala kunveno de la akciularo estos publikigata antaŭe en E. K.; do tiuj kiuj deziras proponi ion, metigi ion sur la agendon, devas antaŭe sciigi la direkcion de la Akcia Societo pri tio. Kompreneble, kiel en ĉiu ordigita societkunveno kaj laŭ la Statutoj, oni nur rajtas decidi

pri aferoj, kiuj estas antaŭe metitaj sur la agendon kaj antaŭe sciigitaj al la akciularo.

La Komitato de la Internacia Pilgrimo Katolika eldonis belegajn poŝtkartojn kaj markojn.

La prezo estas 100 postmarkoj 4 frankojn; 50 p. m. 2.25 frankojn; 12 p. m. 0.60 frankojn. Bedaŭrinde la prezo de la markoj estis nelegebla pro algluado de la specimenoj senditaj al la redakcio precise sur la loko en la cirkulero, kie estis presita la prezo. Ni estas do devigataj prokrasti la sciigon pri la prezo de la markoj ĝis Junia numero.

„Nederlanda Katoliko” eldonis belan poŝtkarton desegnitatan de la Artisto MOERKERK. Ĝi vidigas scienciston, legantan en libro „Esperanto”, super kiu radianta kruco kaj ĉirkaŭe emblemoj pri arto, industrio, scienco k. t. p., kaj super la tuto la enskribo: Nederlanda Katoliko. La estonto estas nia. La tuta homaro parolu Esperanton. Pri la poŝtkarto kaj la ekspozicio de religia arto en 's Hertogenbosch S-ro PASTOOR petas al ni enpresigi jenon:

'S HERTOGENBOSCH, 28 Aprilo 1913.

Mi havas la honoron sendi al vi la unuan cirkuleron de la ekspozicio de religia arto, kies komitato kiel vi scias aliĝis kiel Esperantia Entrepreno. Mi esperas ke vi bonvolos enpresigi la tutan cirkuleron en via grava gazeto „Espero Katolika” kaj aldoni al tio la peton al via legantaro traduki la cirkuleron nacialingve kaj tion enpresigi tute aŭ parte en la naciaj gazetoj kaj sendi ekzempleron de tiuj gazetoj al S-ro M. van der Bruggen, delegito de U.E.A. en 's Hertogenbosch, Orthenstraat, kiujn ni uzos por nia propagando.

Ankaŭ vi trovos en ĉi-tiu letero la artistan poŝtkarton de S-ro H. Moerkerk, eldonita de nia grupo. Ĉu vi bonvolas ankaŭ priparoli ĝin en via gazeto? La prezo estas Sm. 0.22 po 5 ekzempl. (afrank.) Oni mendu la kartojn je S-ro Damen, Chrispijnstraat, 's Hertogenbosch. La profito estas tute destinata por nia propagando kaj la gajnon de la unua milo ricevos la Tilburga grupo por ĝia Esperanto-tago dum la Ekspozicio.

Nia jarkunveno jam havis grandan sukceson en nia urbo. La sekvontan monaton ni komencos kurson por grupo de tre intelektualaj personoj (kasiistoj k.t.p.).